**ESTRARA JARRAPORTO DE ILEI**
**POR LA KOMITATKUNSIDO DE LA 22-A DE JULIO 2023**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI de 8-2023 al 7-2024

**ENHAVTABELO:**

**EVENTOJ**

ILEI-Kongreso kaj –Simpozio 2023; ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2024; ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2025

**INSTANCOJ**

Estraro, Komitato, Sekcioj

**PROJEKTOJ**

Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj"; "30 Oraj Horoj"; Tutmonda Komuna Legado; Homa Ĉeno kaj aliaj video-projektoj; Lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI.

**KAPABLIGO**

Trejnseminario "Interkultura Kompetento"; Seminario de Serbia Esperanto-Ligo; Tago de Lernado; Universitata Agado; Forumoj por Lernejaj Instruistoj; Trejnseminario en Madagaskaro; Eldonado; IPR; JA; ILEI en la Reto

**PREMIOJ**

Premio La Torre; Premioj "Instruisto de la Jaro" kaj "Juna Instruisto de la Jaro"

**KUNLABORO KUN ENMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UEA, TEJO, IFEF, BEMI, lernu.net

**KUNLABORO KUN EKSTERMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UNESKO, FIPLV, Ĉina Komunikila Grupo, Universitato Adam Mickiewicz, Universitato de Zaozhuang

## EVENTOJ

### ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2023:

La la 56-a Kongreso de ILEI okazis en Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro) la 5-12-an de aŭgusto 2023, kune kun la 79-a IJK de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ambaŭ estis sub alta protektado de la Itala Ministro pri Instruado, oficialaj regionaj kaj lokaj instancoj. Por ILEI partoprenis 167 homoj. La prezidanto de la LKK estis Brunetto Casini. La Kongresa temo, organizita de Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella, estis "Instrui Esperanton en lernejoj" kaj tiu de la Simpozio, organizita de Fernando Pita, estis "Instrui (ne nur Esperanton!) ekster lernejaj medioj". Danke al la hibrida formato, multaj programeroj estis registritaj kaj spektablas ĉe la jutuba kanalo "Esperanto + Edukado ILEI": https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/videos

Inter la plej gravaj rezultoj de la Kongreso, kiu havis tre buntan programon, estis:

a) hibrida Komitatkunsido

b) la Simpozio, kies ĉef-preleganto estis Arko (Gong Xiaofeng) kaj dum kiu estis prezentitaj la Aktoj 2020-21 (libere elŝuteblaj el la paĝo pri eldonaj agadoj de la retejo de ILEI)

c) trejnseminario "Interkultura kompetento", zorge de Radojica Petrović kaj Laura Brazzabeni

ĉ) la 102-a AMO-seminario kun la temo "Interkulturo en lernejoj", zorge de Stefan MacGill

d) la premio de "Instruisto de la Jaro" al Liru Chen de Tajvano pro ŝia kontribuo al EToSo

e) "Virina agado", zorge de Alessandra Madella

f) Ekskurso al historia Esperanto-eldonejo Paolet de San Vito al Tagliamento kun akcepto fare de la urbestro

Instruis la lingvo-kursojn Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte, interalie per la noviga uzo de origamio. Dum la kongreso okazis disdono de paperaj revuoj de ILEI kaj, ĉar temis efektive pri "kunkongreso", estis pluraj ŝancoj por la interago de membroj de TEJO kaj ILEI. Aliaj interesaj ekskursoj okazis al Trieste, Udine kaj Venezia. Ankaŭ finance, la Kongreso estis profita.

**ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2024:**

La ILEI-Kongreso 2024 okazas en la turisma urbo Masejo (Maceió) en Brazilo de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024. Dank' al la granda laboro de la LKK (sub la gvido de Aristophio de Andrade) kaj de la estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni, ĝi havas tre buntan programon. La kongresa temo estas "Esperanto por justa edukado". La plejmulto de la ĉeestaj partoprenantoj estas brazilanoj, sed estas hibrida kongreso. ILEI ofertis stipendiojn por subteni ĉeestan partoprenon, dank' al la enspezoj de la profitodona Kongreso de Linjano Orsabla. Ĝis nun aliĝis 66 homoj. Alessandra Madella instruos Seminario pri "Manĝetiketo kiel Interkultura Komunikado" kiel parto de la programo de "Virina Agado". Ĝi enhavos prelegon de Arko, estrino de la nova komisiono pri "Virina Agado" de UEA, en kiu partoprenas multe da virinoj de ILEI. Estos parto de "Virina Agado" ankaŭ la tri prelegoj de Ariadna Garcia Gutierrez el Kubo.

Pretas la riĉa programo de la Simpozio, organizata de estrarano Fernando Pita laŭ la temo "Lingvoj de instruado kaj justa edukado". La ĉef-preleganto estos Ilona Koutny, kiu rememoros sian instruiston István Szerdahelyi, kiu estis prezidanto de ILEI. Prelegos pri la simpozia temo ankaŭ brazilaj fakuloj kaj aktivuloj. Dum la Simpozio estos prezentataj la *Simpoziaj Aktoj* 2022-23 (vidu sube).

**ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2025**

La Estraro de ILEI akceptis la inviton el Serbio, ke la 58-a ILEI kongreso okazu en Beogrado, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025, tuj post la UK en Brno. La ĉeftemo de la kongreso estos "Artefarita Intelekto kaj Lingvolernado".

Laŭtradicie, okazos universitatnivela simpozio pri la kongresa temo en la kongresaj ĵaŭdo kaj vendredo (31.07-01.08.2025) malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj esploristoj pri la temo. La celo estas dialogigi la esperantistan kaj neesperantistan flankojn, kaj konigi Esperanton en

scienculaj medioj ekster Esperantujo.

**INSTANCOJ**

**Estraro:** Prezidanto: Ahmad Reza Mamduhi, Irano; Sekretario: Elena Nadikova, Rusio; Estrarano pri Financoj: Karine Arakeljan, Armenio: Vic-prezidanto: Alessandra Madella, Italio; Estrarano pri Kongresoj: Laura Brazzabeni, Italio; Estraranoj: Fernando Pita, Brazilo; Marija Jerković, Kroatio; Radojica Petrović, Serbio.

La estraro regule kunvenas por pritrakti diversajn problemojn kaj trimonatajn estrarraportojn regule verkas Elena Nadikova kaj Alessandra Madella.

**Komitato:** Komitat-kunsidoj okazis hibride la 7-an de aŭgusto dum la Kongreso de Linjano, kun aprobo de jarraporto kaj laborplano, kaj virtuale la 22-an de septembro, kun aprobo de la nova financa kontrolisto, S-ro Simon Smits, kaj de la financaj dokumentoj pretigitaj de kasistino Karine Arakeljan. En la unua komitatkunsido estis aprobita la stariĝo de la nova sekcio de Ganao, dum en la dua de tiuj de Benino, Kenjo kaj Madagaskaro, portante la tutan nombron de la sekcioj de ILEI al 39. La koncernaj dokumentoj troveblas en la retejo de ILEI : www.ilei.info.

**Sekcioj:** Marija Jerković, kun la helpo de Renato Corsetti, daŭre kontaktis la sekciestrojn de ILEI, ricevante respondojn, kiuj ebligas koni pli funde la staton de la ligo. Ĝisdatigita listo kaj adresoj de la sekciestroj kaj reprezentantoj troviĝas en la retejo de ILEI (https://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php). Respondis ankaŭ la Kuba Sekcio, kiun la Estraro proponos por Komitata aprobo en la Komitat-kunsido de la 22-a de aŭgusto.

**PROJEKTOJ**

**Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj" : Lernu Esperanton en via lingvo.**

Pludaŭras la projekto, lanĉita de IrEA kaj celanta instrui Esperanton en lingvoj, en kiuj la instruado maloftas. En la jutuba kanalo de ILEI aperis registraĵoj de diverslingvaj A-nivelaj kursoj de Esperanto, i.a. en la araba kaj kurda. Ankaŭ registraĵoj de unulingvaj B- kaj C-nivelaj kursoj alŝutiĝas tien, kune kun instruado per Esperanto ekz. pri la svahila (ĝis nun 26 registraĵoj: https://www.youtube.com/watch?v=m44phE-ncAQ&list=PLufbtAhDHic3iBqNugM_ZVBrvEPKlKyph) kaj interligvistiko (ĝis nun 23: https://www.youtube.com/watch?v=q951ml0UINI&list=PLufbtAhDHic0-ZKTJmMkQTpzOBHGLWsx0).

**“30 Oraj Horoj”: Lerneja Projekto**

Pludaŭras tiu instrua projekto kun Itala Instituto de Esperanto, kiu celas enigi la instruadon de Esperanto en lernejojn kaj kiu en 2023 ricevis gravan rekonon de la Itala nacia agentejo INDIRE kaj Erasmus +. Nun granda atento estas donata al ĝia internaciigo. Tiucele, la parto de la profito de la Kongreso de Linjano, kiu laŭkontrakte iras al la LKK, estos uzata por financi la eldonon de la angla traduko de la libro de Alessandra Madella *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. La espero estas, ke la ĉeesto de la angla eldono povos helpi tradukantojn al aliaj lingvoj, kiel ekzemple la korea, persvadi

lokajn neesperantistajn eldonejojn proprakoste subteni la eldonon. Alessandra Madella mem faros la anglan tradukon, dum Chang Sumi faros la korean. La enspezoj de la angla eldono iros al Itala Instituto de Esperanto por financi instruan agadon en Italio, en kunlaboro kun la loka sekcio de ILEI.

### Tutmonda Komuna Legado

Por celebri la Tagon de la Esperanta libro/Zamenhofan Tagon 2023, zorge de Alessandra Madella, ILEI proponis simbolan tutmondan legadon de la klera eseo *La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo* de Julius Glück, Esperanto-instruisto murdita en koncentrejo dum la Dua Mondmilito, dum komencantoj povis same kontentige ĝui la unuajn tri ĉapitrojn de *La teorio Nakamura* de Anna Löwenstein. Intervjuo al Anna Löwenstein pri *La teorio Nakamura* kaj lernu.net aperis en Ĉina Komunikila Grupo: https://esperanto.cri.cn/2023/12/14/ARTIpJksnBjcappri2I82mjo231214.shtml kaj sekve en *Internacia Pedagogia Revuo* 2024/1.

### Homa Ĉeno kaj aliaj video-projektoj

Atingis sian 9-an parton la internacia Homa Ĉeno, lanĉita kiel varb-rimedo en 2022 fare de Maximiliano Garcia. Ĉiuj partoj spekteblas en la jutuba kanalo “Esperanto + Edukado ILEI”. Kadre de MA-GA Filmoj, Garcia ankaŭ aktivas pri la produktado de pli longaj filmoj en Esperanto, kiel *La Silka Vojo* kaj *Sgrafitoj*, kiu premieris sur la granda ekrano dum la Kongreso de Linjano. Kune kun Wei Ningna, nun li okupiĝas pri la projekto “Vojaĝo al Oriento”, kiu temas pri video-kurso en Esperanto pri la mondo de teo.

### Lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI

Alessandra Madella, kun Maximiliano Garcia kaj Cristina Bollini, realigis la paĝojn en la ses oficialaj lingvoj de UNESKO (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa), atingeblajn de la hejmpaĝo de la retejo de ILEI. Ili sekvas la saman ŝablonon: la supra parto estas ĝenerala priskribo de ILEI kaj de ties celoj, sama en ĉiuj lingvoj, dum la suba parto temas pri projektoj, aparte adaptitaj je la prioritatoj de ĉiu lingva kunteksto. Oni povos, do, daŭre libere aldoni projektojn en la lingvoj, en kiuj ili plej gravos. Espereble tio altigos la videblecon de ILEI rilate al UNESKO kaj aliaj projekt-orientataj internaciaj instancoj.

## <u>KAPABLIGO</u>

### Trejnseminario “Interkultura Kompetento”

Dum la ILEI-Kongreso de Linjano estis sukcese organizita la trejnseminario “Interkultura kompetento” enkadre de la projekto Erasmus KA2, zorge de Radojica Petrovic kaj Laura Brazzabeni, dank’al la kunlaboro kun Itala Instituto de Esperanto. Ĝi daŭris kvar tagojn, partoprenis en ĝi preskaŭ 40 personoj el 23 landoj. Fine la plej diligentaj partoprenintoj ricevis belajn atestilojn.

#### Seminario de Serbia Esperanto-Ligo

Estrarano Radojica Petroviĉ estas kunorganizanta Seminarion de Serba Esperanto-Ligo (SEL) por instruista trejnado kaj aktivula lertigo, kiu okazos inter la 17a kaj 24a de aŭgusto 2024 en Beogrado, enkadre de Erasmus-projekto de SEL. Ĝi estas parto de ampleksa evento organizata kunlabore kun LIBE. Ĝi enhavos regionan renkontiĝon de instruistoj kaj ILEI-anoj de balkanaj kaj danubaj landoj. La sukceso

de la evento faciligos la pretigadon de la ILEI-kongreso 2025, dank' al la konstruado de fortaj ligoj kun lokaj instancoj kaj faka tradukista asocio. Pliaj informoj legeblas ĉe https://eventaservo.org/.

**Tago de Lernado**

Marija Belošević, kiel tradicie, organizos la Tagon de Lernado dum la UK de Aruŝo en Tanzanio. Ŝi faros tion ĉeeste en Tanzanio.

**Universitata agado**

La Universitata Laborgrupo, gvidata de Renato Corsetti, kunsidas ĉiumonate per la Zoom-konto de IrEA. La registraĵoj de ĉiuj sesioj de la "Kunpens(ig)ado" spekteblas ĉe la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5.

**Forumoj por Lernejaj Instruistoj**

La Forumoj por Lernejaj Instruistoj, iniciatitaj en 2023 fare de Didier Janot laŭ la modelo de la Zoom-forumo de Universitata Agado, daŭre kunsidas rete, post hibrida kunsido dum la ILEI-Kongreso de Linjano. Nun 9 registraĵoj spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI: https://www.youtube.com/playlist?list=PLufbtAhDHic0vRZ2A9mwVBPSQm85BC6s0. Sekvas la agadojn la Sekretario de ILEI, Elena Nadikova. La celo estas kompreni la bezonojn de instruistoj kaj kion ILEI povas fari por ili, por kreskigi la nombron de membroj efektive laborantaj en lernejoj.

**Trejnseminario por Instruistoj en Madagaskaro**

ILEI subtenis tri-tagan trejnseminarion por novaj Esperanto-instruistoj en Madagaskaro, kunlabore kun UEA. La agado okazis en januaro 2024, sub la gvido de la sekciestrino Miora Raveloharison.

**Eldonado**

Estrarano Fernando Pita pretigis por eldonado la *Aktojn de la Simpozioj de ILEI 2020-21*, kiuj estis prezentitaj dum la Simpozio 2023 kaj senpage elŝuteblas de la retejo de ILEI.

Por festi la ĉi-jaran 75-jariĝon de ILEI en decembro 2024, la eldona agado estas precipe forta ĉi jaron.

Alessandra Madella pretigis la *Aktojn de la Simpozioj de ILEI 2022-23* kaj prezentos la kolekton dum la Simpozio 2024. La libro estos eldonita papere kaj bite fare de Edistudio de Brunetto Casini antaŭ la Itala Kongreso de Montecatini, fine de aŭgusto 2024.

Fernando Pita finpretigos la unuan volumon de la Antologio de la plej bonaj artikoloj de IPR ĝis decembro 2024, por bita kaj papera eldono kun brazila eldonejo.

ILEI financis la eldonon de la lernolibro de Esperanto en la svahila de Joel Muire, inspirita de lia sperto instrui ĉe Universitato Espoir de Kongo kaj korektita de John Magessa. 1 000 koloraj libroj ĉirkaŭ 100-paĝaj en formato B-5 aĉeteblos kontraŭ 3 eŭroj por afrikanoj kaj 5 eŭroj por la aliaj dum la UK de Tanzanio. La enspezita mono estos uzata por financi plian eldonon de la libro, kun fotoj por helpi

interkulturan komunikadon. Por tiu ĉi eldono, fotoj uzeblaj kun la lernolibro elŝuteblos el la paĝo pri eldonaj agadoj de [www.ilei.info](http://www.ilei.info). La libro estas eldonita en Tanzanio per la ISBN-kodoj de ILEI.

Pri la angla kaj koreaj tradukoj de la libro de Alessandra Madella, vidu supre.

La Ligo ankaŭ peris la tradukon al la ĉina de la verkaro de la itala samideana doktorino Antonietta Bernardoni, kiun la gestudentoj de la Universitato de Zaozhuang estas farantaj kun la mona subteno de komitatano Ermanno Tarracchini kaj Kolektivo Bernardoni. La traduko estas farata surbaze de la versio esperantigita de Luigia Oberrauch kaj Alessandra Madella.

***Internacia Pedagogia Revuo* (IPR)**

Redaktoro Jozefo Nemeth aperigis en la organo de ILEI interesajn artikolojn pri instru-rilataj temoj. Dank' al la helpo de Zsófia Kóródy, ni kapablis kompletigi la kolektojn de IPR en kelkaj bibliotekoj, kiel la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang.

***Juna Amiko* (JA)**

*Juna Amiko*, danke al la redaktoro Stano Marček, aperigis artikolojn por lernantoj.

**ILEI en la Reto**

Daŭre aperas informoj pri ILEI kaj ĝiaj partneroj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, Tvitero, Telegramo, tra dissendolistoj, krom en EsperRadio kaj en la retejo mem. Post la Kongreso de Linjano, la aĝo de la spektantoj de la jutuba kanalo de ILEI multe juniĝis dum kelkaj monatoj.

**<u>PREMIOJ</u>**

**Premio La Torre**

Omaĝe al Profesoro Maŭro La Torre (1946 – 2010), ILEI kunlabore kun la familio La Torre anoncis "Premion La Torre 2024-25". Temas pri la kvara eldono de konkurso pri esplorraporto en unu el la kampoj, en kiuj Profesoro La Torre laboris. Jam trapasis la unuajn fazojn de la selektado 8 kandidatoj, kun 7 laboraĵoj. La komisiono estas internacia: Ahmad Reza Mamduhi (prezidanto, Mez-Azio), Renato Corsetti (Eŭropo), Bak Giwan (Orienta Azio), Dennis Keefe (Nord-Ameriko), Fernando Pita (Latin-Ameriko), A. Giridhar Rao (Suda Azio), Trevor Steele (Aŭstralio), John Magessa (Afriko) kaj Alessandra Madella (Eŭropo). La anonco pri la gajninto estos la 2025/02/28, kun solena premiado en marto.

**"Instruisto de la Jaro"**

La Estraro decidis lanĉi konkurson "Instruisto de la Jaro" laŭ kriterioj proponitaj de estrarano Marija Jerković. La premio estos unu-jara membriĝo al ILEI kun bita IPR, unu libro eldonita de ILEI kaj atestilo. Ankaŭ la Estraro de TEJO multe ŝatas la ideon kaj proponis aldoni premion por la "Juna Instruisto de la Jaro" ĝis la aĝo de 35, kun similaj premioj kaj la kriterioj deciditaj de ILEI.

**Ni varme invitas mem-kandidatiĝojn por ambaŭ premioj al [ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com)**
**La premiado okazos la 31-an de decembro, daton de la 75-jariĝo de ILEI.**

## KUNLABORO KUN ENMOVADOJ INSTITUCIOJ

### Kunlaboro kun UEA

Malgraŭ la fakto, ke bedaŭrinde pro diversaj kialoj neniu estrarano de ILEI sukcesos ĉeeste partopreni en la UK de Tanzanio, la Ligo vigle sentiĝos. ILEI helpas subteni la "Kongreson de Afrikaj Virinoj", organizata de Miora Raveloharison kaj Alexandrine Omba. Pri la Movada Foiro zorgos Marija Belošević kaj Mulele Mbassa, la sekciestro de Tanzanio. Dum la malferma ceremonio, nome de la Ligo salutos ĉeeste de la podio Mireille Grosjean, kies salut-vortoj aperos poste en IPR. Prezentos ILEI dum du horoj en speciala programero Aurora Bute kaj Miora Raveloharison, kun la helpo de Joel Muhire, la estro de la Konga Sekcio. ILEI ankaŭ organizis tri ĉeestajn lingvajn kursojn: Miora gvidos ok-horan trejnseminarion por instruistoj, laŭ modelo de tiu, kiun ŝi jam sukcese instruis en Madagaskaro. Helpos ŝin Mireille Grosjean. Joel, kun la helpo de John Magessa, instruos 5-horan kurson por komencantoj, surbaze de sia noveldonita lernolibro de Esperanto en la svahila. Aurora Bute instruos konversacian kurson por progresintoj. La "Tagon de Lernado" organizos Marija Belošević. Alessandra Madella prelegos videe pri la ĉina verkisto Cicio Mar kaj liaj rilatoj kun anglaj verkistoj por la Esperantologia Konferenco.

Kiel dirite, pluraj ILEI-aninoj estas en la nuna komitato (Arko, Malgosia Komarnicka, Alessandra Madella, Miora Raveloharison, Ariadna Garcia Guitierrez) kaj konsilantaro (Anna Löwenstein, Mirejo, Luiza Carol, Maritza Guitierrez, Alexandrine Omba) de la nova komisiono de "Virina Agado" de UEA. La unua agado de la komisiono estas la internacia "rondiranta rakonto" por virinoj "Pri viroj kaj kunikloj".

La observanto de ILEI ĉe UEA estas daŭre Ahmad Reza Mamduhi. La observanto de UEA ĉe ILEI estas daŭre Aurora Bute.

### Kunlaboro kun TEJO

La kunlaboro kun TEJO pri la kongreso de Linjano 2023 estis tre intensa. Nun ni kunlaboras pri la premio "Juna Instruisto de la Jaro" (vidu supre).

La reprezentanto de TEJO ĉe ILEI estas la vicprezidantino Snehaĵa Venkatesh (kun helpanto), dum la reprezentanto de ILEI ĉe TEJO estas daŭre Fernando Pita.

### Kunlaboro kun IFEF kaj BEMI

Ĝis la fino de 2023, ILEI kontinuis kunlabori kun Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Biciklista Esperantista Movado Internacia kaj la Esperanto-Grupo "Giorgio Canuto" de Parmo kadre de la ekologia projekto VERDEN de Erasmus + KA2, helpe de Kosmo-strategio kaj UEA.

### Kunlaboro kun lernu.net

La retejo lanĉita de Katalin Kováts helpis nin por la Tutmonda Komuna Legado 2023, disponebligante al ni la unuajn tri ĉapitrojn de *La Teorio Nakamura* por nia retejo. Intervjuo de Alessandra Madella al Anna Löwenstein por Ĉina Komunikila Grupo multe parolis pri lernu.net.

## KUNLABORO KUN EKSTERMOVADOJ INSTITUCIOJ

### Kun UNESKO

La reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO estis Emmanuel Desbrières, Maximiliano Garcia, Alessandra Madella kaj Didier Janot. Al la Ĝenerala Konferenco, kiu okazis en Parizo de la 7-a ĝis la 22-a de novembro 2023, ILEI sendis tri reprezentantojn: Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj Gilles Tabard, kiuj raportis en IPR 2024/1. Emmanuel ankaŭ partorenis en la paralela Malferma Ceremonio de la Junulara Forumo. Komenciĝis la pretigado por la venonta Ĝenerala Konferenco en Uzbekio en 2025.

### Kun FIPLV

Daŭras la kunlaboro kun Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj, kies membro ILEI estas. La kontaktpersono estas la prezidanto Ahmad Mamduhi. Alessandra Madella verkis por la Bulteno de FIPLV artikolon pri la "30 Oraj Horoj" en la dua numero de 2023 kaj pri la vizito de Duncan Charters al la Universitato de Zaozhuang por la dekariĝo de la loka Esperanto-Muzeo en la unua numero de 2024. Alessandra ankaŭ kompilis la jarraporton de ILEI pri la jaro 2023 por la retejo de FIPLV.

### Kun Ĉina Komunikila Grupo

Alessandra Madella daŭre aperigas artikolojn en la retejo de Ĉina Komunikila Grupo (Ĉina Radio Internacia). Krom la jam menciita intervjuo al Anna Löwenstein, estis intervjuo al Renato Corsetti kaj al Ahmad Reza Mamduji pri Premio La Torre kaj al Spomenka Štimec pri la internaciaj tradukaj agadoj de Kroata Esperanto-Ligo. Estis ankaŭ raportoj pri la du-monata evento por celebri la dekjariĝon de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang kaj pri "Seminario pri Esperanto kaj Grandkanala Kulturo en Yangzhou", organizata de Longarko (Zhang Changsheng) kun la partopreno de la Esperanta Lego-grupo de Arko

### Kun Universitato Adam Mickiewicz, Pollando

ILEI morale subtenis la gravegan instruadon de Interlingvistiko kaj Esperantologio fare de Ilona Koutny kaj ŝiaj helpantoj.

### Kun la Universitato de Zaozhuang, Ĉinio

ILEI morale subtenis la agadojn de la 4-jara Esperanto-fako kaj de la loka Esperanto-Muzeo. Alessandra Madella prelegis kaj partoprenis en la du-monata celebrado por la Esperanto-Muzeo, kiu kulminis kun la vizito de Duncan Charters, eks-prezidanto de ILEI kaj la nuna prezidanto de UEA, en decembro 2023.

Vic-prezidanto de ILEI: Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2024-07-15